# PRO GNO ★ ZIO

Sciencfikcia

N O V E L A R O
elpoligita
de
A . M A D E J

---


Prognozio ( J.A. Zajdel) ... 3

Temido ( Z. Skamski ) ... 11

La teorio de konservita memo (D. Filar) ... 17

Formoj kaj ombroj (D. Filar ) ... 24


---


La Juna Penso

F 47340 Laroque Timbaut
Jul.1973 - N° 92A

# Prognozio

Mi alvenis iom pli frue: la horloĝo sur la haltejo montris kelkajn minutojn post la dekkvara. Varmego estis turmentiga. Mi preterpasis ĝardeneton de iu kafejo.Estis tie multaj homoj, sed iu aĝa sinjoro ĵus liberigis lokon ĉe la tablo. Mi eniris, esperante ricevi ion malvarman por trinki.

La tableto staris apud malalta palisaro. Atendante kelnerinon, kiu malaperis en la interno de la kafejo kaj ne revenis dum longa tempo, mi observis trafikon sur tiu ĉi mallarĝa kaj per aùtomobiloj kutime ŝtopita strato . Tamen hodiaù veturiloj moviĝis malvigle kaj lante,kvazaù ankaù ili estus lacaj pro varmego, kaj la preterpasantoj paŝis malrapidete en malbutonumitaj vestoj,trovarmigitaj kaj premitaj per inerta galareto de la varmega aero. Dum tiaj tagoj homo sentas, kvazaù la tempo malrapidigus sian kuradon. La pensoj pasas malvigle kaj atente evitas ĉiujn gravajn aferojn, prefere ŝvebante super sablozaj apudmaraj plaĝoj aù almenaù ĉe la urbaj basenoj...

- Ĉu oni povas sidiĝi apud vi, sinjoro ?

Mi levis la kapon. La demandanto staris antaù mi, en kolora ĉemizo, ŝvitante kiel ĉiuj kun esprimo de laceco sur la vizaĝo.

- Bonvolu, mi diris. Neniun mi atendas, ĉi loko estas libera.

Li sidiĝis. Ne estis juna, la haroj komencis al li griziĝi, kaj la frunto faltigita, kaj la sulkigita vizaĝo kun brilantaj gutetoj de ŝvito malkaŝis, ke antaù mi estas homo, kies vivo ne estis facila.

Almenaù tiel mi lin taksis. De tempo al tempo mi ŝatas legi en homaj vizaĝoj, por poste konfronti miajn rimarkojn kun realo. Li devis konstati, ke mi tro longe lin rigardas, ĉar li ekmoviĝis maltrankvile kaj, levinte la okulojn, demandis:

- Pardonu, ĉu vi ... iam renkontis min ?

- Ŝajnas, ke ne..., mi hezitis, ankoraŭfoje rigardante lin pli atente. Kaj vi, ĉu vi rememoras min ?

Li ekridetis kaj malfermis la buŝon, kvazaŭ li volus ion diri, sed certe rezignis, ĉar nur kapneis kaj turnis la kapon al la stnato. Mi supozis, ke dum tia varmego li eĉ ne volas paroli kaj daŭre mi atendis kelnerinon.

- Priservado de la klientoj ne estas ĉi tie plej bona. Jam dek minutojn mi atendas kelnerinon, mi diris duone al mi duone al mia samsortano.

- Ne klopodu sinjoro, li diris, ne deturnante la okulojn de al la strato. La kelnerino venos post dek minutoj. Sed nek bieron nek gasakvon vi ricevos...

- Mi vidas, ke vi bone konas ĉi tieajn kutimojn, mi ekridetis. Certe ofte vizitas vi la kafejon?

Por mia miro li rigardis min malgaje kaj diris:

- Mi ne scias!...

- Kion vi ne scias? Ne scias vi, ĉu...

- Simple mi ne scias. Mi ne memoras.

Mi skuis la ŝultrojn, konsiderante liajn vortojn kiel ankoraŭ unu manifestadon de malemo babili. Senpripense mi etendis manon al mia paperujo kaj senpense mi foliumis trovîĝantajn en ĝi paperfoliojn de tajpaĵo. La teksto , kiun mi tiomfoje relegadis, nun ŝajnis al mi idiota,komplika kaj nekomprenebla. "Se mi legos la sekvantan paĝon, mi konjektos, ke tio ĉi estas tute senvalora..., mi pensis. Tiu varmego emigas tiel pesimisme." Mi fermis la paperujon. Bedaŭrinde, nenion mi jam povas ŝanĝi. Post kvaronhoro mi lasos la tekston en la redakcio kaj nur atendos la opinion de la recenzantoj...

- Kion vi deziras, sinjoroj?...

Jen fine venis kelnerino. Malvigle ŝi deskuis el la tableto eretojn de tabaka cindro kaj atendis kun teda mieno.

- Bieron mi petas, diris mi.

- Ne estas. Mankas, respondis ŝi kolere.

- Gasakvo?

- Mankas.

Mia najbaro tamen bone orientiĝis pri provizo de la kafejo per malvarmigaj trinkaĵoj.

- Ĉu entute estas io por trinki? Malvarma ,komprenebleble..., demandis mi rezigne.

- Firmaa trinkaĵo. Ĉu vi deziras? Ankaŭ la alia sinjoro ?

Ni ambaŭ konsentis pri la trinkaĵo. La kelnerino malaperis kaj mia najbaro grimacis pro abomeno.

- Mi ricevos abomenan, varmetan fluidaĵon..., li grumblis.

- Se mi opinias laŭ viaj antaŭaj aŭguroj, mi ridetis, ankaŭ tio devus plenumiĝi...

- Mi ne aŭguras, diris li subite. M i  s c i a s.

- Kiel do? Ĉu estus vi... viziulo? mi ŝercis .

- En la parapsikologia nomenklaturo tiel tio nomiĝas, diris li. Mi tamen nomus mian kazon alie... Viziádo,kiel vi certe scias, estas pli malpli preciza antaŭvidado de la ĝeneralaj aferoj en estonteco. Se temas pri mi,mi scipovas antaŭvidi aferojn ligitajn nur kun mi persone. La faktojn, en kiuj mi partoprenos senpere, aŭ tiujn, pri kiuj mi tiel aŭ aliel ekscios. Ne, malbone mi diris. Mi ne antaŭvidas, mi scias... Tiel, kiel vi sinjoro tion , kio okazis al vi aŭ apud vi, ni diru, antaŭ unu horo,antaŭ unu jaro kaj tiel plu...

- Vi volas diri, mi rimarkigis, ke tiel, kiel mi memoras mian pasintecon, vi memoras vian estontecon, ĉu?

- Jes, se oni povas tiel absurde sin esprimi, mi memoras mian estontecon. Mi scias tion, kio okazos. Mi nomus tion p r o g n o z i o , tio bone sonas.

- Bonege! Entute tio estas bonega ideo, perfekta spritaĵo. Dum tia varmego ne perdi bonhumoron...

La nekonato kvazaŭ malgajiĝis, rigardante min de sub duonfermitaj palpebroj.

- Mi estus tre feliĉa, se tio estus nur spritaĵo..., li diris mallaŭte. Bedaŭrinde, jen la vero,sinjoro Kowalski !

- Kioon? Vi konas mian nomon ? Ne memoras mi, ke mi ĝin diris ...

- Eĉ se vi ĝin dirus, mi ne povus ĝin memori! Ĉar krom prognozio mi estas plene trafita de amnezio! Ĉu vi komprenas ? Ĝuste tio estas mia granda malfeliĉo, duobla malfeliĉo: mi memoras eĉ ne unu momenton el mia pasinteco,sed kontraŭe mi konas la tutan mian estontecon!

Mi ne povis eligi voĉon. Stupore mi rigardis tiun ĉi homon, ne sciante ĉu li ŝercas, ĉu parolas serioze.

- Sed...ja tio tute ne eblas! Kaj de kie vi scias mian nomon ?

- Mi informiĝos en estonteco kaj tiel mi m e m o - r a s...

- Do vi asertas, ke ĉio ĉi, kion mi aŭdis,estas vero?

Li jesis silente. Ankaŭ mi silentiĝis, konsiderante liajn vortojn.

- Do vi... ne memoras eĉ tion, kio okazis antaŭ unu sekundo? Kaj scias vi tion, kio okazos post dek jaroj? - mi demandis lin subite.

- Jes. Nur tiel, ke tion, kio okazos post momento,mi scias pli precize kun pli multa kvanto da detaloj, ol tion, kio okazos post kelkaj jaroj. Estas tute same kiel pri memorado de la aferoj pli malpli proksimaj en la tempo, respektive al normala homo... Sed tio, kio okazis en la pasinteco eĉ je sekundoj fora de la nuna momento, estas por mi senrevene kaŝita... Same kiel por vi tio, kio okazos post momento...

- Sed...,mi diris, mi ja scias, ke ankaŭ post momento mi plu sidos ĉi tie kaj babilos kun vi...

- Kaj je la tria, aŭ pli precize kelkajn minutojn antaŭ la tria, vi eliros el la kafejo kaj iros al ĉi domo sur alia flanko de la strato. Kompreneble, ke tion vi povas scii, sed neniam je cent procentoj. Eble ĝuste mi foriros de ĉi tie tuj ? Eble trairante la straton vi falos sub aŭtomobilon ? Tiajn eventualaĵojn vi tute ne konsideris. Ne, vi povas esti trankvila, sub aŭtomobilon vi ne falos, kaj mi ne intencas eliri de ĉi tie ĝis mi ricevos ion por trinki. Mi diris tiel nur pro ekzemplo.. Do, vi povas antaŭvidi estontecon, nur bazante sur la pasinteco kaj la kuranta momento. Mi dume konas estonteecon, normale mi konas ĝin... Sed kontraŭe, pri pasinteco mi povas opinii nur helpe de retroanalizo de la faktoj, kiuj nur sekvos.

Mia menso funkciis lantege. Tio, kion diris la nekonato, superis mian kapablon kompreni dum tridekgrada varm ego...

- Se estas tiel, kiel vi diras, mi vokis en subita klarvido, do kiel vi povas logike respondi miajn demandojn, se kiam vi aŭdis ilin, vi ja tuj ilin forgesas ?

- He, kara sinjoro! Pripensu prudente! La nekonato

ekridetis kompreneme. Vian demandon vere mi tuj forgesas, sed mian respondon al ĝi mi bonege memoras! Ja apartenas ĝi - antaŭ ol mi ĝin diros - al estonteco kaj al tiu plej proksima! Sed la estonteco estas por mi malfermita!

- Ni supozu..., mi murmuris, konsternita. Sed restas ankoraŭ alia afero:por kio vi demandas? Demandis vi min ekzemple pri tio, ĉu mi iam renkontis vin antaŭe.Ja mian respondon vi konis anticipe!

- Ree vi eraras! li respondis trankvile. Se mi ne starigus al vi ĉi demandon, vi respondus al ĝi neniam! Ja mi povas scii nur tion, kio okazos iam, tiel do mia demando estis logika neceso!

- Hm...,mi diris, jam tute perdante ĉian koncepton pri tiu ĉi stranga historio. En tiu okazo mi tute ne komprenas, kial vian miraklan econ vi nomas malfeliĉo? De jarcentoj homoj revis pri io simila. Kiu ne volus koni sian estontecon?

- Vi eraras, sinjoro. Ĉiuj eraras, diris li malgaje, skuante la kapon. Mi scias plej bone, kia estas la pezo antaŭscii ĉion, ĝisfunde, ĝis plej etaj detaloj! Ĉu neniam vi deziris ion forgesi, iajn malagrablajn momentojn de la vivo? La forgesado estas tre grandioza afero... Simile grandioza estas ekkoni tion, kio povas okazi,sed, je Dio, en unu kaj en alia kazo, ne plene, ne ĝisfunde! Ĉu volus vi forgesadi, kiel mi, ĉion kio estis? Kiu vi estas, kiel vi nomiĝas kaj kion vi travivis ĝis nun? Ne, vi certe ne konsentus pri tia forviŝo de via tuta person_eco...Simile malagrable estas koni la tutan estontecon, mi certigas tion al vi. Pri tio vi povas fidi al mi...

- Kaj al vi sinjoro... Kiel tio okazis? Eble sur la bazo de la cirkonstancoj, dum kiuj vin trafis tiu ĉi malfeliĉo, tiu katastrofo de la memoro, eble oni povas sukcesi trovi iun rimedon por revenigi vin al normala stato? Eble tio ĉi estas kontaĝa ? mi ŝercis, deŝoviĝante iom de li.

- Kiel mi povas scii, kiel tio okazis? Ja mi eĉ ne scias tion, ĉu mi al vi, ĉu vi al mi altabliĝis, kaj kiel komenciĝis la babilado pri la temo. Vi ankoraŭ ne povas alkutimiĝi al tio, ke estas antaŭ vi homo, kiu moviĝas kontraŭ la realeco: mia "memoro" fariĝas pli kaj pli malabunda, ĉiu vorto, ĉiu okazintaĵo rabas al mia memoro

peceton da scio pri mia vivo!

- Do ankaù pri mi vi scias malpli kaj malpli,malgraù ke vi faris demandojn kaj observis min dum la interparolo?

- Kompreneble. Sed malgraù tio mi sentas, ke ankoraù iam mi aùdos pri vi. Ĉar supozeble mi jam neniam vin renkontos... Jes, certe mi renkontos vin neniam , sed...

- Vi ne renkontos min..., mi diris kaj enpensiĝis. Se ĉio ĉi estas vero kaj se li asertas, ke min ne renkontos, do ŝajne pri tio li scias sendube... Tiel do... ĝi estas nura ŝanco por mi...

- Sinjoro, mi diris kun ŝajna indiferento, vi komprenas, ke ne estas al mi facile kredi pri ĉio ĉi, kion mi aùdis de vi. Tamen mi volas kredi tion kaj tial mi kuraĝas peti vin pri io... Ĉu ne bonvolus vi rakonti ion el estonteco?... Ion tian, kion oni post la koncerna tempo povos konstati...Ekzemple, ĉu vi ne konas iun...inventon el estonteco? Se vi konsentus priskribi ĝin por mi sufiĉe detale...

- Ne! la nekonato rompis al mi decide kaj akre. Tion mi ne faros.

- Sed mi tre petas vin!

- Se mi diras, ke ion mi ne faros, tio ne signifas, ke mi rezistas, sed normale mi scias, ke tion mi ne faros. Mi scias, ke neniam al iu mi rakontos pri estonteco.

Li videble estis kolera. Nur post momento li trankviliĝis kaj aldonis pli milde:

- Se mi kontentigus vian scivolon, mi endanĝerigus vin. Jes, jes, ne faru surprizitan mienon! Bonvolu nur memori: Ni diru, ke mi priskribos al vi iun aparaton,pri kiu mi scias, ke en estonteco ĝin konstruos iu alia,ekzemple sinjoro X. Se vi fariĝus posedanto de la inventaĵo antaù ĝia publikigo, vi ne rezistus kontraù la deziro akiri famon per tiu ĉi inventaĵo. Aliflanke, estas sciate, ke la aparato estos konstruota de sinjoro X. Do konkludo estas simpla: devus trafi vin iu fatalo, antaù ol vi sukcesus konstrui prototipon. Mi ne rajtas endanĝerigi vin al certa morto... Kiel vi vidas, estonteco senpripense malkaŝita antaù facilanima homo, povas lin mortigi!

- Sed ja vi...konas vian tutan estontecon? Kiel do vi

povas protekti vin antaŭ io tia ?

- Protektas min kontraŭ la danĝero ĝuste tio, ke mi konas ĝin la tutan. Dank'al tio mi estas tute determinita. Se vi havas por vi - nefineble - almenaŭ ŝajne - multajn variantojn de la vivo, tiel mi havas nur unu kaj ĝin devas sekvi. Cetere, vi simile havas nur unu varianton: tiun, kiun vi travivos. Sed almenaŭ vi iluziiĝas,ke vi povas elektadi el inter nefinebla nombro da eblecoj. Mi ne povas elektadi... Ho, kion mi donus por ke mi povu rememorigi al mi kelkajn detalojn el mia pasinteco, kaj forgesi tion, kio min trafos en estonteco...

- Neniel helpus al vi tio, eĉ se iu, kiu konis vin antaŭe rememorigus al vi iujn detalojn el via vivo, vi ja ilin tuj forgesus! mi diris.

- Vi pravas... Sed... eble, eble tio povus sanigi ? Cetere, mi ne scias, ĉu la transformiĝo estas kuracebla, aŭ ne...

Li eksilentis por momento kaj poste alitone aldonis:

- Jes, jam mi scias, per kio mi konas vian vizaĝon... Vi eldonos tiun bonegan libron, kiun mi legos post unu jaro! Mi rememorigis al mi, tie mi vidos vian fotografaĵon. Tio estos vera kuriozaĵo! Ĉu vi jam verkis ĝin ?

Mi rigardis lin, ankoraŭfoje surprizita pro liaj eksterordinaraj kapabloj... Ĉu li legis miajn pensojn ? Telepatio, aŭ io simila ? Ĉar tiun lian prognozion mi tute ne povis malgraŭ ĉio ekkredi.

- Vi diras, ke tio estos bona libro? Ĝuste mi iras lasi ĝin en la presejo...

- Tio estos via sukceso... Bedaŭrinde okazos tiel,ke mi ne legos viajn pluajn librojn...

- Kaj tiu, pri kiu vi nun parolas...ĉu vi memoras,pri kio ĝi temas ?

- Jes, kompreneble mi memoras! Precipe ege impresos min tiu ĉi belega scenejo de la planedo, kiun malkovras viaj herooj...

"Li devis enrigardi mian tajpaĵon, kiam mi foliumis la tekston!" mi ekpensis kaj laŭte diris:

- Ne atendos mi plu tiun ĉi firmaan trinkaĵon. Proksimiĝas la tria, mi devas jam iri. Estis agrable babili kun vi. Eble vi bonvolos pagi por mi, jen estas la mono.

Mi leviĝis, prenis la paperujon kaj etendis la manon al mia kunbabilanto.

- Kowalski... mi prezentis min aŭtomate kaj tuj venis mian kapon, ke...ĝuste tiel, per tiu ĉi mia prezentiĝo, li "memoris" mian nomon. Sed tuj mi riproĉis min pro tia penso, kiu signifis, ke mi subkonscie kredas la rakontadon de la nekonato. Kiel oni povas serioze konsideri tian evidentan absurdaĵon ?

- Bedaŭrinde mi ne povas prezenti min! li diris ridetante pardonpete. Mi ne memoras mian nomon. Ĉar sciu , ke mi estas trafita de stranga malsano...

- Mi scias, mi scias. Rakontis vi tion antaŭ dekkelkaj minutoj!

- Ha, jes... Nu, do vi komprenas... Mi vere ne memoras pri kio ni interparolis, sed mi opinias, ke mi diris al vi...

- Jes, jes, ĉion vi diris... Pardonu, mi devas rapidi, diris mi malpacience.

Mi kapriverencis al li por adiaŭo, kaj enmiksiĝis en la homamason.

........

Mia nova romano trovis entuziasman akcepton ĉe la eldonisto. Li diris rekte:

- Tio estos via granda sukceso, sinjoro Kowalski.Precipe fortan impreson elvokas tiu grandioza scenejo de la planedo, kiun malkovras viaj herooj.

- Ĝis hodiaŭ mi ne povas konsciiĝi al mi, kiu kaj kiam diris ion similan...

Ĉu la memoro min trompas? Momenton, kion mi devis...

Kiu estas mi ? Kiel mi nomiĝas? Mi sidas ĉi tie,kaj post momento ekster la fenestro ekiĝos tempestego, oni devas fermi la fenestron... Ho, jam blovegas! Kial mi ne leviĝis por fermi la fenestron? Post momento ventego rompos la vitron...

--==o==--

# Temido

Mi nutoj pasis lante. In rigardis malgrandajn, brilantajn radetojn pendantajn sur blankaj fadenoj. Pro kio tiom da mikrofonoj ? Por la genia "Temido" devus sufiĉi unu. Tiom oni skribis pri la genieco de ĉi maŝino.. Se ĝi estas tiom saĝa, do kial la tribunalo? Kaj kial oni venigis lin ĉi tien, al tiu ĉi grandega kaj malplena salono, plenigita per oranĝkolora lumo, kvazaŭ hejmeca, sed tamen morna ? La saĝa "Temido" devus lin juĝi kontumace kaj sendi al li hejmen kopion de la verdikto. Li havas nenion por aldoni. Ili ja havas registraĵon el "Aĥilo". La registraĵon sur dekdu kanaloj, la registraĵon, kiun oni ne povas falsi nek nuligi.

Al ĉi genia skatolaĉo tio devus sufiĉi. Do kial la tribunalo kaj kial ĉi mikrofonoj pendantaj sur blankaj fadenoj kvazaŭ pufaj araneoj. Ĉu "Temido" deziras aŭdi sangpulsadon en liaj tempioj ?

\- Leviĝu, la Tribunalo venas! kruda vira voĉo aŭdiĝis de supre kaj plenigis la salonon per basa eĥo.

Li leviĝis. La pordo malantaŭ la tribunala tablo malfermiĝis senbrue. Tri juĝistoj, enirantaj per lantaj, majestaj paŝoj, aspektis same kiel sur malnovaj bildoj, kiujn In vidis en muzeo. Nur togoj estis en alia koloro aŭ eble en la sama, sed en oranĝkolora lumo ili aspektis alie.

\- Ĉu la akuzito ĉeestas ?

\- Jes.

\- Nomo ?

\- In.

\- Profesio?

\- Piloto de unua licenco, de sesa specializo.

\- In, vi estas akuzita pro tio, ke neglektante ĝeneralajn regulojn, striktajn instrukciojn devigajn sur la ferdeko de kosmoŝipo kaj fine normojn de profesia etiko, vi endanĝerigis vian vivon dum pilotado de la kosmoŝipo "Aĥilo". Ĉu vi komprenas la enhavon de la akuzo ?

\- Jes.

- Ĉu vi konsentas kun la riproĉoj ?
- Jes.
- Ĉu vi konfesas la kulpon.?
- Jes.
- Ĉu vi havas iujn atentigojn koncerne formuligojn de la akuzo ?
- Nur tion, ke mi ankoraŭ vivas, do la endanĝerigo de la vivo ne estis plena.
- Juĝejo estas serioza loko, In.
- Mi komprenas. Mi havas neniujn riproĉojn koncerne la formuligojn.
- Sidiĝu, In. Rakontu okazintaĵojn de tiu ĉi kritika vojaĝo.
- La Alta Tribunalo konas ĉi okazintaĵon el la ferdeka registraĵo.

- Jes, ni konas la enhavon de la registraĵo, kaj ankaŭ precizan ĝian analizon, faritan de ekspertoj, kiuj uzis la delogikan sistemon. La maŝinoj delogikaj tamen estas, kiel sciate, ankoraŭ ne tre perfektaj. Alie ol la logikaj sistemoj. La Tribunalo volas do, ke vi prezentu al ĝi la veron pri la vojaĝo kun strikta priskri[illegible] de emociaj situacioj.

- Simple mi kompatis "Aĥilon". Estas ĉio.

- Ne, In, tio ne estas ĉio.

- Bone. Sed antaŭe mi volus demandi la Tribunalon.

- La Tribunalo konsentas.

In per mano montris la mikrofonojn.

- Ĉu krom la Tribunalo funkcias ankaŭ "Temido" kaj kio estas ĝia tasko ?

- Jes, "Temido" uzata estas jam de tri jaroj. Ĝiaj taskoj havas helpan karakteron. Preciza klarigado de ĝiaj taskoj rabus al ni tro da tempo.

- Ĉu oni ne povus elŝalti ĉi skatolaĉon ? Mi ne ŝatas malinteligentajn maŝinojn. Mi interrilatas kun ili jam dekdu jarojn kaj mi estas saturita de ili.

- In! "Temido" havas 25 miliardojn da kristalneŭronojn; kompare kun ĝi la ferdekaj maŝinoj kun kiuj vi interrilatis, havas komplikecon de mezepoka abako. Cetere, rezigni pri laboro de "Temido" ne troviĝas en la kompetenteco de la Tribunalo. Vi devas tion akcepti, In. Ankoraŭ antaŭ cent jaroj ekzistis ĉe tribunalo funkcioj de

prokuroro kaj advokato. "Temido" inter aliaj kunigas ĉi ambaŭ funkciojn, nur sen la tiama arlekenaĵo, sed kun scio pli granda ol ĉiuj akuzantoj kaj defendantoj kune. Sed nun rakontu, In.

- La lernejon de pilotoj mi finis kun distingo...La provlaboron mi plenumis sub la gvido de kapitano Sung , sur la marsa trako - ĉirkaŭira. Poste oni min sendis al centro en Gadir, kie mi akiris la sesan specializon. De tiu tempo mi kondukis nure "superrapidajn". Kelkfoje mi flugis per "Vikingo", foje per "Selenga"... De ok jaroj mi pilotas "Aĥilon". Mi ekŝatis ĉi ŝipon kaj ĝuste tiam ... mi kompatis ĝin. Mi transportis dek stabiligilojn por petropenetracia kalkulatoro. Sur Uranuso ĉesis geologiaj serĉadoj, ĉar difektiĝis al ili ĉiuj stabiligiloj kaj la kalkulatoro freneziĝis. La Centro decidis sendi novajn stabiligilojn. Mi imagis, kiel tie enuas la homoj restadantaj en infera neniofarado, do jam la trian semajnon mi superis la trian rapidecon, kaj jam la duan monaton mi flugis per la kvina. Ĉiuj prognozoj de orbitaj stacioj estis instigaj. Neniujn flugantajn fiaĉaĵojn por dum plej proksimaj monatoj oni antaŭvidis...

- In, antaŭ tribunalo oni povas esprimi sin libere, sed la ĵargono de pilotoj estas, kiel ni aŭdas, troige libera.

- La trako estis libera de meteoroj kaj dika kosmopolvo - korektis sin In. Tamen mi sentis ian maltrankvilon. Eble pro tio, ke nenio okazis. Mi neniun antaŭeniĝis, neniu flugis de antaŭe. Transportilojn ĝenerale flugantajn laŭ "ĉirkaŭira", mi preterpasis en malproksimeco da sepdek lumminutoj. Sendante al ili "bonan vojon", post duonhoro mi ricevis "reciproke". Malbone mi dormis. Mi ŝakludis kun la surferdeka kalkulatoro. Ĝenerale ĝi gajnis kun mi nur en la tria grado de efikeco, iam en la dua, nun ĝi gajnis en la unua. Ne estis mi en bonaj kondiĉoj. La sepdek unuan tagon de la vojaĝo okazis ĉi katastrofo.

- Katastrofo ne okazis, In.

- Por mi tio estas katastrofo, se mi devas stari antaŭ la tribunalo kaj minacas al mi perdo de la licenco. Aperis tiu ĉi aŭtomatika idioto je la 12a horo laŭ la ferdeka tempo. Precize dum tagmezo. Ĝi iris de antaŭe

laŭ dekstra kurso, 22 gradojn kaj 2 minutojn. Niaj kursoj estis konverĝaj ĝis milimetro. Kvazaŭ diablo ilin kalkulis. La kolizio devus okazi post 3 horoj kaj 10 minutoj. Ĝia rapideco estis je limo de kvara kaj kvina . Subita eniro en malajn arkojn povis nin ankoraŭ savi . Mi sendis sciigon : "Alarmo, kurso konverĝa. Eniru plenan dekstran arkon" . Tuj venis la respondo: "Komprenite. Reciproke, bonan vojon". Ne estis dubo, ke tiun kosmoŝipon gvidas difektita aŭtomato. Mian stirejon plenigis jam akra, virina voĉo de la kalkulatoro: "Endanĝerigo de la tria grado. Transiri al la savraketo. Forlasi la ferdekon. Endanĝerigo..." kaj tiel plu ĉiam la samo. Tiam mi decidis eniri la arkon. Mi enŝaltis stiradon per la superarko de tiu kosmoŝipo.

– Ĉu vi ekpensis pri tio, ke minacas al vi superŝarĝo, kiun neniu povas travivi ?

– Mi pensis pri tio. Pensis mi ankaŭ pri la perspektivo atendi dum kelkaj monatoj helpon en la savraketo. Atendado en la ŝtala kaĝo, kie oni eĉ piedojn ne povas rektigi. Atendado duonkonscia, ĉar ja "sava" povas obteni nemulte pli bonan kurvon ol la patra ŝipo kaj ankaŭ en ĝi la superŝarĝo povas dispremi ostojn. Kaj mi ekpensis pri "Aĥilo" frakasita kaj ŝanĝita en polvonebulon kaj metaleskan vaporon...

– Rakontu plu, In.

– Mi elŝaltis laŭtparolilon de la kalkulatoro, por ke ĝi ĉesu kriaĉi pri la danĝero. Tiam enŝaltiĝis la tonala transformilo kaj pepis la samon, sed jam kode. La kalkulatoro sciigis, ke mi atingis ŝanĝon de la kurso je kvin milisekundoj. Ĉiujn histojn disŝiradis al mi granda doloro. Ĝuste tiam venis la telegramo de tiu freneza aŭtomato: "Alarmo! La konverĝa kurso. Eniru plenan maldekstran arkon!" La mezurindikiloj montris ĝian turnon mala al la mia. Tio estis savo. Per resto de konscienco mi notis ŝanĝon en la pepado de la tonala transformilo. Okazis transiro de la tria al la dua grado de endanĝerigo. Sed la superŝarĝo kreskis plu. Je 30 minutoj antaŭ renkontiĝo kun tiu – , mi perdis konsciencon. La cetero troviĝas en la ferdeka registraĵo, kiun ĝis nun mi ne konas.

– Ĉu vi estas edzigita, In ?

– Ne.

- Ĉu eble vi havas fianĉinon ?
- Ne, mi ne havas.
- Kiel oni povas tion klarigi?
- Neniu junulino fianĉiĝus kun piloto de la sesa specializo. Ili tre ofte ne revenas. Do mi ne havas sukcesojn sur tiu ĉi kampo.

Ekregis silento. In viŝis ŝviton de la frunto. Ree li rigardis arĝentajn mikrofonojn. Li supozis, ke nun "Temido" alparolos la tribunalon. Turmentis lin trudema penso, ke "Temido" ekos ripeti:"Endanĝerigo de la tria grado. Forlasi la ferdekon" kaj tion ĝi ripetados pli kaj pli laŭte, ĝis timigitaj juĝistoj forkuros. Tamen unue parolis la juĝisto:

- "Temido" .
- Preta, respondis agrabla voĉo, venanta el nedifinita direkto.
- Ĉu vi havas iujn kromajn demandojn ?
- Jes. Ĉu la akuzito scias, ke la nombro da pilotoj de unua licenco, sesa kategorio, aktuale ne superas dek?
- Mi scias, respondis In.
- La piloto de la sesa specializo pli valoras por la socio ol kelkaj kosmoŝipoj en kategorio de "Aĥilo". Ĉu la akuzito scias tion ?
- Mi supozas tion.
- Dankon.

Ree alparolis la juĝisto:

- Diru kvalifikon de la ago en absolutaj poentoj.
- Minus 443, respondis la virina voĉo.
- Probableco de verdiremo?
- Naŭdek naŭ komo naŭdek naŭ.
- Orientiĝo pri la ago ?
- Plena.
- Kvalifiko de la ago en poentoj relativaj ?
- Minus kvarcent ok.
- Tiom multe? miris la juĝisto.
- Minus kvarcent ok, ripetis "Temido". Ĉu transiri al logaritma skalo ?
- Ne necesas.
- Grandigi precizecon ĝis dekonoj da poento ?
- Ne bezonate. Donu diagnozon neŭrologian.
- Stato normala.

- Psikologian?
- Normala.
- Kial tiom da poentoj relativaj ?
- Etaj malgravigaj cirkonstancoj. Malraciaj impulsoj emociaj.
- Pli precize.
- Manko de emocioj direktitaj al homo. Escepteco de emocioj materie direktitaj al la aparato "Aĥilo".
- Motivigu absolutan poentaron.
- Alta malutileco socia.
- Pli precize.
- Kvar mil okcent dudek tri minusaj poentoj en la skalo dekmil.
- Proponu la verdikton proporcie al poentaro.
- Senigi licencon por periodo de unu jaro. Admono. Translokigi sur transportan kosmoŝipon.

La juĝistoj leviĝis. De supre eksonis basa, severa voĉo:

- Leviĝu. La Tribunalo iras interkonsiliĝi.

Kiam li restis sola, li diris duonvoĉe:

- Stulta vi estas "Temido". Viaj dudek kvin miliardoj da kristaloj taŭgas por ĵeti ilin en balaaĵujon.

"Temido" respondis per agrabla aldo:

- Ĉi registraĵon mi viŝas. Riproĉojn kun konfidenca karaktero mi ne registras.

--==o==--

Dariusz Filar

# La teorio de konservita memo

Li iris apud li, per aùtomate mezuritaj egalaj paŝoj. Robotoj... Tio ĉi estis plej dolora - ĉiama akompanado de la sintrudaj kreitaĵoj senanimaj. Terurigis lin iliaj senesprimaj maskoj, buŝoj duonfermitaj, kiam metaleske parolis. Leviĝu , 093, - manĝu, 093 ! - Dormu, 093!

Iufoje pene li regis kreskantan pasion, li volis preni troviĝantan ĉemane malmolan objekton kaj bategi iliajn senesprimajn maskojn. Bategi tiom longe, ĝis iliajn buŝojn tordos homa grimaco, ĝis en iliaj okuloj oni rimarkos iun simplan, homan senton - ĉu timon, ĉu malamon. Sed li sciis, ke tio ĉi estas vana... La ŝtalaj brakoj fulmrapide lin senarmigos kaj ree li ekaùdos senigitan de iu ajn senta nuanco metaleskan: - Trankviliĝu,093!

La pordegon de la Silenta Citadelo li trapaŝis antaù unu jaro. Li memoras troviĝantan super ĝi surskribon, kiu esprimas la esencon de la Puno speciala: "Kulpulo pro la krimo kontraù homo punendas je dumviva separado de la homoj" Antaù lia alveno estis okupitaj naùdek du ĉeloj. Apartigitaj de li per muroj netralasantaj sonojn kaj lumon,pasigadis ĉi tie vivon simplaj poŝrabistoj , generaloj, kiuj iam skizis planojn de grandiozaj konkeroj, filozofoj-epigonoj de elmodiĝintaj kruelaj teorioj, artistoj, kies arto servis al malbono, ĉiuj ĉi, kiuj en la momento kiam estis kreita la nova difino de la krimo kaj akcepto de la unuNura "Universala Puno Speciala" tiel aù aliel falis sub ĝian atingopovon.

Mi estas la naùdek tria, kiu kontraùcelis pacon de nia ideala socio, pensis li senironie. Nu, finfine, li murmuris en si mem, kondamnante ĉi tiujn naùdek du ili eble havis iujn motivojn. Mi ne konas iliajn aferojn. Sed kondamni min ili ne rajtis, li aldonis tuj, ili ne komprenis

min kaj tial ne rajtis tiele verdikti kontraŭ mi.

- Mia historio estas tute alia ! li ekkriis al apude iranta roboto.

- Via historio ne interesas min, 093! respondis ĝi.

Robotoj...Ili devos esti lia nura akompanantaro ĝis la tago... Li eksentis terurtremon. Li timis morton.

°°°

Bob kaj Tep konis unu la alian de longe, de tiom longe, kiom nur ili memoris. En la jaro 2111 ili ekstudis en la Akademio de Kosma Medicino. Plimulton da tempo ili pasigis kune kaj tial ĝenerale oni konsideris ilin amikoj. Preskaŭ neniu sciis, ke tiu ĉi daŭra kontakto ne estas amikeco, sed senĉesa dura batalo. Lukto de du tute diversaj karakteroj, du malegalaj homaj specoj, la samaj nur laŭ la forto de obstino. Ili sciis, ke plej prudente estus por ili disiĝi kaj ie malproksime realigi siajn vivoplanojn en la nomo de propraj koncepto kaj idealo. Tamen por tiu ĉi prudenta solvo estis jam malfrue. Bob kaj Tep mem implikiĝis en la ludon, kiu devis finiĝi per la venko, venko unusignifa. Kaj tiun ĉi venkon ili atendis.

Jaron post la fino de la studoj, ili asistantiĝis en la Katedro de Kirurgio. La estro de la Katedro, prof. Trex, tiam laboris pri sia poste plej fama ellaboraĵo "La teorio de konservita memo".

La scipovon de rekreado de la homa organismo, sur la bazo de antaŭe preparita programo, oni majstris jam sufiĉe longe. Povus ŝajni, ke jen antaŭ la homo malfermiĝis la vojo al senmorteco. Registrante la skemon de la organisma strukturo de iu ulo en la aĝo ekzemple tridek jarojn, oni povus laŭ la registraĵo, post trapaso de ajna tempo, rekrei jam de longe malvivan estaĵon. Ĝi estis precipe signifa por la eksperimentaj pilotoj, por la vetŝoforoj, sciencistoj laborantaj pri danĝeraj problemoj, unuvorte - por ĉi ĉiuj, al kiuj ebleco de akcidento estis nedisigebla elemento de la profesia risko.

Publikigon de la ellaboraĵo pri la temo oni iam agnoskis kiel renverson en la medicina sfero. Iom pli precizaj esploroj tamen baldaŭ pruvis, ke la ĝojo estis tro frua. La metodo rekrei ulon laŭ la bazo de la biologia plano, havis gravan mankon. Ja ĝi permesis vere plenan

rekonstruon de liaj biologiaj trajtoj, tamen tio ne koncernis la psikajn trajtojn de lia memo. La rekonstruita cerbo fariĝis dependejo de iam arigitaj scioj, tamen asociado, precipe de pli alta speco, estis limigita."La Paciento" transformiĝadis en iuspecan aŭtomaton. Do pro evidentaj kialoj oni rezignis aplikadi la metodon.

Profesoro Trex serĉis alian solvon. Li asertis, ke se ni jam scipovas rekonstrui la korpon, do oni devas prilabori metodon konservi la cerbon , kaj poste manieron de ĝia kunligo kun la nova organismo. Ĉar kiel ajn la maniero rekrei plenan nervosistemon estis majstrata,tamen kunligo de ĝiaj partoj, kiaj ekzemple: cerbo kaj mjelo, longe kaŭzis al sciencistoj egajn malfacilojn.

La lastan problemon prof. Trex solvis mem. La de li inventita specifiko, kiun li nomis "Neuroino", perfekte plenumis rolon de katalizilo en la procedo kunligadi la diversajn elementojn de la nervosistemo.

Dum solvado de la problemo konservi la cerbon, kun helpo venis eltrovo sur unu el ĵus koloniigitaj planedoj, de ĝis nun nekonata kemia kombino.Orsteno 9, ĉar tiel oni nomis ĉi kombinon, havis multajn eksterordinarajn avantaĝojn: estis leĝera, boneltenadis altajn temperaturojn, karakterizis ĝin ega imuneco je mekanikaj deformiĝoj.

o
o o

Konsiderante ĉion ĉi en la 33a numero de "Medicinaj Kajeroj", el la tago 17a de julio 2122 j., prof. Trex skribis:

"... Per la ekzemplo, kiun ni prezentas, ni volas konigi al la legantojn "La Teorion de konservita mem" ,rezulton de longjaraj esploroj faritaj en nia katedro.

"Piloto de kosmo-ŝipo,suspektante danĝeron,funkciigas aparataron, kiu disigas lian cerbon de la korpocetero, poste ĝin enfermas en la globon el orsteno 9 kaj ĵetas ĝin en la spacon. La en la globo instalita aparataro ne permesas al histoj morti. La globo pro relative ne tro grandaj dimensioj kaj karakteriza formo en pli malgranda grado estas minacata de mekanikaj difektoj ol ujo , en kiun oni metus la tutan piloton. Tiu ĉi rimedo ekskludas ankaŭ malfacilaĵojn, kiujn dum la savado de la

tuta organismo kaŭzus longe ne ŝanĝata pozicio de la korpo, ĝiaj fiziologiaj agoj, problemo de nutrado. La en nia Katedro konstruita aparataro limigas la tempon necesan por ĝia funkciigo kaj plenan pretecon de la ujo por flugi - ĝis unu centono de sekundo. En la danĝeraj momentoj, kiam piloto entreprenos la decidon tro malfrue, ekfunkciigo de la aparataro okazas aŭtomate. Instalita en la globo radiosendilo ebligas ĝin facile retrovi,kaj poste la problemo limiĝas al kunligo de la savita cerbo kun la sur la Tero rekonstruita korpo."

Bob kaj Tep estis kunaŭtoroj de la sukceso de prof. Trex.

°°°

Tep atente observis la montrilojn kaj ciferplatojn de la aparatoj. Ĝis la fino de la eksperimento restis ankoraŭ dekkelkaj minutoj. Li sidis en la fotelo, fermis la okulojn, li revis. Li pensis pri tio, kiam li venos la Katedran Laboratorion kaj anoncos, ke la problemo pri akcesoraj efektoj de Neuroin-aplikado estas solvita. Li pensis pri tio, kiel li surprizos la profesoron kaj aliajn laborantojn de la Katedro, kaj precipe Bob. Bob... Antaŭ unu horo devis informi lin pri indikoj de la aparataro de la III-a Grupo. Sed ne faris tion. Nun certe li sidas en iu klubo, rakontas spritaĵojn aŭ promenas kun Arl. Ĉiam la sama - konfuza, malrespondeca. Ĉiam senzorga... Malgraŭ tio ĉiuj ŝatis lin pli. La profesoro neniam konfidus al Bob eksperimenton postulantan atentemon kaj zorgon - tion oni lasis al Tep. Sed kiam estis necese trovi iun novan ideon, ĝia aŭtoro certe estis Bob. Tepon incitis la rilato de Bob al tiaj, kia li. Li sciis, ke li estas konsiderata kiel sendanĝera trostudemulo.
- Ĝis la tempo, li murmuris, ĝis la temp' ...

Ankoraŭ nur kelkaj tagoj. Li finos laboron, sukcesos, fine li povos iom ripozi. Ĝis nun eksperimentoj tenis lin seninterrompe. Nun estos alie - li trovos al si junulinon, ludos, komencos pentri, aŭ eĉ skulpti. Fine li pruvos, ke li estas pli bona ol Bob. Pruvos al li pravecon de sia konduto, sian superecon kiel sciencisto kaj homo.

Signal-sonorilo vekis lin el la revoj. Li saltis al la pupitro - nur unu rigardo sufiĉis al li por konstati, ke

laùvica eksperimento fiaskis, li ankoraù ne trankviliĝis, kiam eksignalis informtono:

- Halo, Tep! - Bob estis en tre bona humoro, kio ankoraù pli kolerigis Tep.

- Aùskultu, mi ne informis vin pri la "III", ĉar konkorde kun miaj antaùvidoj tio estis sensignifa. Sed vidu, mi havas por vi alian "bombon", mi hodiaù sukcesis en la eksperimento kun derivaĵoj de Neuroino. Preparaĵo, kiun mi ricevis en multaj kazoj superas "Neuroinon".

Tep kolerege elŝaltis la informtonon . Unuafoje li enviis al Bob.

°°°

"Medicinaj Kajeroj" de la 19a de decembro 2123,informfako.

"Juna, kapabla laboranto de la Katedro de Kirurgio ĉe la Akademio de Kosma Medicino, BOB WROS faris tre gravan inventon por pluaj eksperimentoj de la Katedro. La de li pretigita preparaĵo, "Neuroino II", permesos pli precizan aplikadon ol ĝis nun de la metodoj jam pli frue prilaboritaj de la Katedro."

Tep trian fojon jam legis tiun ĉi lakonan komunikaĵon kaj komencis malami Bob.

°°°

Partopreni en la eksperimento ambaù aliĝis senhezite. Eble unu antaù la alia ne volis montri timon, aù eble tentis ilin granda aventuro. Ili estis la unuaj homoj , kies organismo estis subdonota al eksperimento de la rekonstruo kaj kunigo kun savita cerbo. Ili devis forflugi per malnova, difektita kosmoŝipo, kies averio estis neevitebla. Plue ĉio devis sekvi konkorde kun la teorio de Trex. La eksperimentoj plenumitaj sur bestoj finiĝis per plena sukceso, malgraù tio ambaù riskis multe.

La 27an de januaro, 2124, oni preparis precizan priskribon de iliaj organismoj, kaj la sekvan tagon ili forstartis.

Tep neniam poste povis rememorigi al si, kiam venis al li la ideo, kiun dum ĉi tiu flugo li efektivigis.

Kontaktado de la kosmoŝipo kun la bazo limiĝis nur al la radia komunikado - sufiĉis ĉi komunikadon rompi por nura momento... Ĉiun el ambaù foteloj oni ekipis per la

aparataro kun orstena globo kun signo X ĉe la fotelo de Tep, signita per V ĉe la fotelo de Bob. Sufiĉis nur nerimarkeble ŝanĝi fotelon, por fariĝi sur la Tero alia homo, almenaŭ posedanto de alia korpo.

Tep per singarda movo elŝaltis la radioaparataron. De tiu ĉi momento iliaj interparoloj ĉesis dependi de ies kontrolo. Bob nenion rimarkis.

– Bob, diris Tep, mi ne fartas tre bone. Ĉu vi povus por nura momento eksidi en mia fotelo ?

Bob estis surprizita, sed konsentis. Tiele do elira pozicio estis jam atingita. Tep enŝaltis la radion.

– Halo, bazo! li diris. Estis eta averio de la radio. Jam ree ĉio estas en bonordo.

Ne atendante, ke la surprizita Bob sukcesos ion diri, li ektiris stangeton signitan per T – transplantado.

o
o o

Pri tio ke li sukcesis, li konvinkiĝis nur kiam li rekonsciiĝis.

– Halo, Bob, vekis flegistino, kiel vi fartas ?

Do li jam disponis la korpon de Bob!

– Bonege! li rediris.

Terurigite, Bob rigardis en la spegulon. Ja tio ne estis lia vizaĝo, tio estis vizaĝo de Tep!

– Redonu al mi mian korpon! li ekkriis. Ĉu vi aŭdas? Redonu mian korpon !

La ĉefkuracisto metis manon sur lian brakon.

– Bonvolu trankviliĝi, diris li kvietige, tio estas nur ŝoko, ĝi pasos.

o
o o

De tri semajnoj Tep okupis en la Katedro la postenon de Bob, kiu, kiel TEP suspektata je mio-dividiĝo, restadis je senfina ferio.

"Kio estas korpo, pensis Tep, grava estas mia cerbo en la korpo de Bob". De tago al tago pli kaj pli li tion kredis. Rabo de la korpo al Bob permesis al li venki iun misteran faton – lia cerbo en la korpo de Bob komencis akiradon de sukcesoj ! Okazis, ke li tute forgesis pri sia antaŭa malamiko, en kies formon li estis enkorpiĝinta.

Ĉi-tage li iom pli longe restis en la Instituto.

La senbruan malfermon de la pordo li ne aŭdis , sed nur eksentis. Antaŭ li staris Bob. Tio signifas, ke staris antaŭ li lia propra korpo entenanta nun la cerbon de Bob.

- Kion vi volas? li kolere demandis.

- Redonu al mi mian korpon. Mi komprenis jam ĉion.

- Vi scias, ke tion mi ne faros, respondis Tep.

Ili rigardis unu la alian kun rabio. Ekbatalis.

°°°

La juĝisto jam tralegis la verdikton. Restis al li nur la rajto diri lastan alparolon, kiun aŭskultos homoj. Li volis ankoraŭ provi.

- Komprenu min, li petis, mi ne mortigis Bob Wros ! Bob Wros jen mi ! Tio signifas... signifas... "Kiel tion klarigi al ili ?" pensis li rapide. "Kiel tion klarigi?"

- Mi mortigis mian propran korpon, li komencis ankoraŭfoje, la korpon, kiun oni al mi ŝtelis...

Ili rigardis lin malvarme. Ne komprenis.

°°°

Robotoj... Jen la plej dolora puno, ĉiama akompano de tiuj ĉi sintrudemaj, senanimaj kreitaĵoj.

--==o==--

Dariusz Filar

# Formoj kaj Ombroj

Post dek minutoj venos al mi Toden. Mi atendas lin senpacience, ĉar Toden estas mia nura konato, nura homo, kiu min vizitas, sed ja... mi timas tiun ĉi viziton. Ĝi ree mergos min en la animstaton de senespero,kaj gvidos min en la problemaron, por kiu estas tiel malfacile trovi solvon. Kial mi ne fariĝis matematikisto,aŭ nuklea fizikisto ? Ili ĉiuj havas difinitajn taskojn , konas celojn kaj rimedojn por ilin atingi, scias ĉion, kion scii devus.

Min plenigas sentoj kaj pensoj superfluaj...Tiel almenaŭ ŝajnas al mi, ne, pri tio mi estas tute certa post la babiloj kun Toden.

Vi jam divenis: "Ankoraŭ unu kun siaj absurdaj klopodoj! Kion li ĝuste volas?" vi demandos kaj eble tuj metos for la tekston...

Jes, mi konfesas kulpon: mi estas humanisto! Mi estas unu el tiuj ĉi tricent, pri kiuj mencias lastaj statistikaj indikoj de UNO. Unu el tricent kompare kun kvar miliardoj da matematikistoj, ses miliardoj da fizikistoj, tri miliardoj da kemiistoj, du miliardoj da...

Humanistoj estas ankoraŭ tricent. Aŭ eble eĉ tricent, ĉar pasintjare oni jam ne akceptis studentojn al la Humanista Fakultato de Eŭropa Universitato, kaj mi estas unu el la lastaj studantoj, kiuj forlasis la murojn de ĉi studejo. Post la studfino mi volis akcepti laboron en la Universitato, sed pro proksimiĝanta likvido de la Fakultato la plano fiaskis. Mi anoncis min al la Centra Disponejo pri Fakuloj.

- Vi povas reveni hejmen, ni mem sciigos vin, se vi estos bezonata, bojis metaleske deĵoranta roboto.

Mi atendis. Longe, preskaŭ du jarojn. Dum tiu tempo mi faris studojn pri la dudekjarcenta usona literaturo. Mi verkis multe laŭ tradicia metodo: sur apartaj folioj, per fontoplumo. Mi opinias, ke ŝalti cerbon de la aŭtoro al registroaparato kaj aŭtomata registrado de ĉiuj liaj konsideroj povas esti utila en ekzaktaj sciencoj, sed en la kampo de literaturo tio nepre devas fiaski. Do verkis mi multe, la folioj kreskis en grandan stokon, sed ja mi sciis, ke mia laboro servas al nenio kaj neniu.

Fine mi ree anonciĝis ĉe la Disponejo, sed nun mi ne lasis min trompi al robotoj, mi postulis interparolon kun la Ĉefa Specialisto. Decidgeste mi puŝis pordon kun gravuritaj literoj : "ĈS-CDF".

La Specialisto akceptis min preskaŭ sincere, li estis ekonomisto matematikista, fakulo pri utiligado de la viva forto kaj dank'al ĉi faktoro troviĝanta en liaj devizoj li konsideris min kiel reprezentanton de la kuza fako, kiel "frata animo de humanisto" , tiel li diris pri si.

- Mi volas labori, mi diris. Ses jarojn mi dediĉis al strečigaj studoj. Scias mi, en kiu lingvo parolis Homer, scias mi, kion timis Faŭsto kaj kial elefanto marŝis al Kilimanĝaro. Mi scias naskiĝdatojn de ambaŭ fratoj Grimm kaj mi scias, ke antaŭnomo de London estis Jack. Mi scias ĉion ĉi, vi povas min ekzameni, sed poste donu laboron!

La Specialisto rigardis min atentoplene.

- Domaĝe, ke vi ne interesiĝis pri psikologio, li diris fine. Psikologoj estas bezonataj. De tempo al tempo kiam nia eduksistemo ne povas sukcesi... Ja ni laboras kun homoj kaj povas okazi devioj. Tiam ni petas helpon de psikologo. Sed vi? Vi estas filologo.

- Mi povas kompletigi mian scion el la sfero pri psikologio, mi interrompis malkuraĝe, mi legis iom de Freud, iom de Wells, Fromm...

- Vi ŝercas...,la Ĉefa Specialisto de CDF ridis. Ĉu vi parolas serioze tiujn ĉi, pardonu la difinon, anekdotojn de antaŭ kvar jarcentoj? Enfosite en viaj humanistaj saĝaĵoj vi ne rimarkis, kion atingis la hodiaŭa psikologio. Cetere..., li enpensiĝis.

Li rimarkis mian konsterniĝon.

- Psikologojn ni havas cent sep. Elinter dudek tri miliardoj da homoj ilian helpon bezonas ne pli ol kvincent personoj. Eĉ se ili tute ekspluatus la pacienton,

kion ili ofte faras, tamen ĉiu el ili havus okupon por ne pli ol unu monato. Kaj vi estus ankoraŭ unu konkuranto.

- Mi volas labori, mi diris.

- Sinjoro, la Specialisto perdis paciencon, la Ĉefaj Aŭtoritatoj de la Universala Tera kaj Ekstertera Komunumo de Homoj kaj la kunlaboranta kun ĝi Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj garantias al vi plenan vivtenon, vojaĝojn, loĝejon kun biblioteko plena de libroj, en kiuj vi povos fosi laŭvole. Kion vi volas pli ?

- Mi volas esti utila, mi devas labori!

- Bone, li diris. Konsiderante la staton de via scio jam post 4-jara kurso, mi opinias, ke vi povos iĝi konservisto de mekanikaj ludiloj. Ĉu vi konsentas?

Mi rifuzis. Ripari ludilojn ŝajnis al mi humiliga okupo por doktoro pri humanistaj sciencoj. Ĉi laboron ĝenerale oni komisias al robotoj. Homojn regas nur matematiko, mia plej granda malamiko.

La koncepto saturi socion per matematiko naskiĝis jam en la dua duono de la XXIa jarcento, kaj poste ĉio sekvis rapide. De la plej fruaj vivojaroj oni edukis la infanojn pri principoj de logiko, konduto laŭ feraj matematikaj tezoj. Dum tempopaso pasioj kaj ardeco de sentoj fremdiĝis al la homoj. Malmultaj unuopuloj, kiuj iam rezistis kontraŭ la matematizaj tendencoj, ekstermiĝis rapide. La homoj estis pli kaj pli feliĉaj, kreis pli perfektajn formojn, per formoj simetriaj kaj fermitaj oni konceptis sian propran vivon. Al matematiza tendenco subiĝis ĉio, medicino, arto... Dank'al la plej novaj medicinaj esploroj, laŭvicaj generacioj naskiĝis sen plej eta difekto, altaj, sveltaj, kun ideale regulaj trajtoj. Ĉiujn lernejojn pri plastikaj artoj oni likvidis jam ĉe la fino de la XXIIa jarcento. En la fakultatoj pri matematiko ekzistis nur rudimenta kreaĵo, nomata Instituto por Projekti Fantaziajn Formojn, kaj ĝiaj diplomitoj preferis nomi sin artistoj, sed kion ili sciis pri arto!?

Stranga povas ŝajni la transdaŭro de la Humanista Fakultato ĉe Eŭropa Universitato. Decidis certe tradicio: de ĉi tiu fakultato devenis la opozicia tendenco kaj tie daŭris plej longe. Literaturo... Verkistoj, kiuj iam formis gravan parton de la socio, malaperis. Tio estas

evidenta. Kiel verki pri amo, pri iu lukto kun si mem, anima barakto, strangaj streboj, kiel oni povas paroli al nuna homo pri tiuj ĉi por li nekompreneblaj problemoj,per kiuj vivis literaturo? Por homo de nia tempo ĉi problemoj estas vanvortoj. Li scias, ke inter multaj al li konataj homoj li devas trovi partneron, kiu estos por li optimume alĝustigita, li scias, ke sian laboron li devas plenumi kun maksimuma efiko, kaj infanojn eduki tiel, ke ĉiel ili similu la gepatrojn.

Kial mi ne estas akomodiĝinta al ĉi epoko ? Denove la tradicioj: mia avo dekano de la Fakultato, la patro - estro de la Instituto pri Literaturaj Esploroj - edukis min laŭ propraj, opoziciaj, kiel mi jam diris, kredoj.

°°°

Ĝis alveno de Toden ankoraŭ ses minutoj. De kie mi lin konas? Li bezonis iam por siaj esploroj iun libron sciencfikcian el la unuaj jaroj de la XXIIa jarcento. Enciklopedio informis, ke ĝi implicas rudimentan formon de iu teorio, pri kiu interesiĝis Toden. Por krei al si pli larĝan bildon de la problemo li deziris konatiĝi kun konvena fragmento de la libro. Bibliotekoj,kie oni povus trovi tiajn malnovaĵojn, ne estas nun multaj. Mia kolekto estis unu el malmultaj amasigantaj scienc-fikciajn librojn. Toden eksciis pri tio kaj petis permeson utiligi necesajn materialojn. Li posedis tre precizajn bibliografiajn indikojn, mem rapide trovis la bezonatan eron kaj mi eĉ ne scias kio ĝi estis.

De tiu tempo Toden komencis min viziti. Evidente, li havis en tio iun intencon - li estis adepto de cirkla divido de la labortago. Mi supozas, ke iu kombino de korektigaj tendenoj determinis sur la cirkonferencon etan segmenton, kiu, blokita unufoje en monato per la moto : "Ripozo ekster la laborloko kaj familio", signifis vizitojn ĉe mi. Mi sciis do, ke en la rilato de Toden al mi estas nenio, kion antaŭ jarcentoj oni nomis altruista simpatio, sed fari al li pro tio iujn riproĉojn estus absurdo. Toden ne scias, kion signifas "altruista simpatio". Mi devas ĝoji pro tio, ke babiladon kun mi li agnoskis kiel efektivan formon de ripozo.

Mi ekŝatis Toden, cetere kun lia persono ligiĝas ko-

menco kompreni nuntempulojn de mi. Memoras mi, ke kiam antaŭ du jaroj li decidis edziĝi (ĉi difino transdaŭris ĝis nun), li venis al mi kun gravaj duboj. Li timis ,ke familio damaĝos al lia scienca agemo. Tiam mi pruntis al li libron de antaŭ multaj jarcentoj, verkitan en la XXa jarcento en Polujo fare de Stefan Żeromski (Ĵeromski) kaj rakontantan pri iom similaj al problemoj de Toden, hezitoj de la ĉefa heroo, doktoro Judym. Post semajno Toden redonis al mi la libron.

- Judym malbone agis, li diris, forlasi Joasja-n estis eraro.

- Nu ? malfacile mi kaŝis scivolon.

- Li ne analizis la aferon ĝisfunde, diris Toden,oni devus ankoraŭfoje kalkuli.

- Kion!? mi ekkriis.

- Mi kalkulis, daŭrigis Toden, edziĝos mi venontmonate.

Mi sidis mirigite.

- Tio estas simpla, diris Toden, eĉ vi komprenos.

Li skribis formulon sur unu el la multaj paperfolioj plenigantaj la ĉambron:

$$Y = y + y \sqrt[t]{a} - yB^{t} \pm u$$

- Y, li parolis, estas efikeco de la laboro post geedziĝo, y tiu sama efikeco esplorata dum fraŭla periodo. Ni akceptas, ke y = 1 kaj tio permesas al ni skribi la formulon en pli simpla formo.

Ree li skribis sur la folieto:

$$Y = 1 + \sqrt[t]{a} - B^{t} \pm u$$

- a, li diris, signifas frakcian altiĝon de efikeco de agado en la rezulto de atingita vivostabileco, B , ankaŭ esprimita frakcie, signifas falon de efikeco kaŭzitan per amasiĝo de geedzaj,kaj poste de familiaj devoj, t signifas tempon esprimitan en jaroj, kaj u estas koeficiento korektanta eventualajn deviojn. Ĉu vi komprenas ? li demandis.

- Mi komprenas, respondis mi, sed plu mi sidis mirigite. Ankoraŭ mi ne sciis, ke la plej grava ŝoko estos por mi io alia.

Toden staris en la pozo de profesoro en altlernejo.

- Ni analizu apartajn faktorojn, li komencis. Dum tempopaso la valoro $\sqrt[t]{a}$ kreskas. Signifas tio, ke dum tempopaso la sento de familia stabileco plenumas pli kaj pli gravan, pozitivan rolon. Samtempa falo de la valoro $B^t$ signifas, ke de jaro al jaro la absorbiĝo pri la persono de edzino estas malpli alta kaj donas nur malgrandajn perdojn. Vi certe demandos, de kie preni konkretajn valorojn a kaj B en la kazo de tiu aŭ alia persono ?Do, mia humanisto - li daŭrigis - ili estas prikalkulataj je la bazo de empiriaj indikoj prenitaj el enketoj , kiujn ni ĉiuj pleniĝas ĉiujare. Se vi volas scii, kiajn koeficientojn iu havas sufiĉas demandi ĉe adresa oficejo.

Mi aŭskultis lin, kiel oni aŭskultas alveninton el fora planedo. En nia universitato neniu faris lekciojn pri aplikado de matematiko dum socia vivo, kaj ekster la universitato... mi estadis tiom malofte.

- Do en la kazo pri mi kaj Arlet, diris Toden, la indikoj sumiĝas...

"Arlet? mi ekpensis, ja ĉiam ŝajnis al mi, ke lia fraŭlino nomiĝas Nada".

- ... indikoj sumiĝas, daŭrigis Toden, mia a = 0,04 kaj ŝia B = 0,12, u ni akceptis + 0,05. En la unua jaro la formulo havas esceptan formon. Signifas tio...

Toden montris al mi folieton kun jena rezulto:

$$Y = 1 + a - B \pm u ;$$

$$Y = 1 + 0{,}04 - 0{,}12 + 0{,}05 = 0{,}97$$

- ...rezultas el tio, Toden amuzis mia necerta mieno, ke dum la unua edzeca jaro la efikeco de mia laboro falos je 3%, sed jam la duan jaron la efikeco Y = 1,2356, el tio rezultas efektoj pli bonaj je 23,56 % kompare al fraŭla stato. Poste, de jaro al jaro, la valoro Y altiĝas, kvankam jam ne okazas subitaj saltoj.

- Kial vi akceptis u = 0,05? mi interrompis lin.

- Tio estas ĝenerala principo, diris Toden. Por geedzoj kun diversaj profesioj oni akceptas la koeficienton egala al nulo, por geedzoj kun sama specializo 0,05 . Escepton formas "artistoj", li parolis la vorton malice, vi scias tiuj de fantaziaj formoj, se ili volas geedziĝi, do akceptas u egala al - 0,15.

Ĉion li klarigis al mi kaj pretigis sin por foriri.

- Kaj post kelkaj semajnoj, li ekridetis, Arlet estos mia edzino.

- Ho, ĝuste! mi rememorigis al mi. Ja vi ĉiam parolis pri Nada.

- Jes, Nada, li diris. Komprenu, ŝia koeficiento B montriĝis por mi tro alta, kaj u egala al nulo. Ni priparolis ĉion triope kaj mi edziĝas kun Arlet, ŝi estas plej bona amikino de Nada, ili amas unu la alian kvazaŭ fratinoj.

Li jam foriris, kaj mi provis reordigi pensojn. Tra la kapo kuris al mi eretoj el poemoj de Ronsard. Ĝis nun mi kredis pri grandaj kaj emociaj sentimentoj, klare mi vidis idealojn. Toden neniigis ĉion. Nur tiun tagon mi komprenis, kial mi ne povas iĝi psikologo.

Toden pravas, mi enfosigis min inter libroj, mi vivas inter ombroj.

Romeo kaj Julieta...Interese kiel li solvus tion?

o
o o

Ĝis alveno de Toden ankoraŭ minuto. "Iometon da frenezo!" vokis ĉe la fino de la XXa jarcento iu frustrita filozofo. Iometon da frenezo ? Por kio ?

Mi atendas. Post kelkaj sekundoj Toden rakontos al mi pri sia kelkmonata fileto, kiu pasintsemajne jam ekregis multiplikon.

--==o==--

En la broŝura serio de L.J.P. :

| | | |
|---|---|---|
| 77A. | Gandhi kaj satjagraho (tri prelegoj) | ...1,00 FF |
| 79A. | La Tabuo (kvar noveloj de J.Nesvadba) | ...1,00 |
| 80A. | Initiation à l'Esperanto (An Kaù) | ...1,00 |
| 81A. | La Laborista Esperantismo (E.Lanti) | ...1,00 |
| 82A. | Alveno de abundo kaj konsumsocio | ...0,50 |
| 82B. | En anarkista socio, kiel kondutos la individuo? (Johano Grav) | ...0,30 |
| 83B. | La rentumo, kiun ni pagas (W. Schmid) | ...0,30 |
| 84A. | Ĉu neperforta revolucio aù revolucia liberiga milito? (T. Ebert) | ...1,00 |
| 85A. | Vivi en komunumo (M. Schneller) | ...0,50 |
| 86A. | Manlibro de nova homo (Rufegon) | ...1,00 |
| 87A. | La Granda Liberiĝo de l'homoj pere de Scienco (Jacques Duboin) | ...1,00 |
| 88A. | Pri Edukado (E. Lanti) | ...1,20 |
| 89A. | Eduko kaj vivsignifo (J.Krishnamurti) | ...1,20 |
| 90A. | Memvola servuto (La Boesi) | ...1,20 |
| 91A. | El Leteroj de E.Lanti | ...1,20 |
| 92A. | Prognozio (novelaro el la pola) | ...1,20 |
| 93A. | Nekombitaj pensoj (500 sentencoj de la pola satiristo S.J.Lec) | ...1,00 |
| - | Komuna Kantareto | ...0,60 |
| - | Absolutismo (prelego de E.Lanti) | ...0,60 |
| - | Rimarki (kompilo de konferencoj de J. Krishnamurti) | ...0,50 |

La prezoj, en francaj frankoj, entenas la afrankon. La mendojn adresù al via LJP-peranto aù rekte al la broŝurservo: La Juna Penso, F 47340 Laroque Timbaut.
poŝtkonto: 3374 04 Bordeaux , Francio.

Gérant & imprimeur: C. Baudé, F 47340 Laroque Timbaut.
Commission paritaire de presse.............nº 39 863.